La unua simpozio de pedagogia kibernetiko okazinta en 1979 estis titolita 'Apliko de kibernetiko en pedagogio' kaj enhavis 3 problemgrupojn: edukado, didaktiko, teknikizado kaj organizado de klerigo (komp: Piechowicz). Laŭ prezentitaj sintenoj kaj vidpunktoj eblas disdividi partoprenintojn en 3 grupojn:

1) unua, asertanta, ke kibernetiko pritraktas stiradon ĉiam rilate al unu apartigita el ĉirkaŭo sistemo, kaj pritraktado de retrokuplo sencas nur rilate al unu distingita sistemo.
2) dua, pritraktanta stiradon ĉiam kiel ligon inter du sistemoj, el kiuj unu estas stiranta, dua stirata. En tiu ĉi kazo retrokuplo okazas inter stiranta kaj stirata sistemoj.
3) tria, serĉanta rimedojn kaj metodojn de apliko de kibernetiko por didaktikaj celoj. Inter ili troviĝas informteoriistoj, projektantoj de komputilsistemoj ktp.

Prezentitaj referaĵoj ĉefparte temis pri programita instruado, programitaj lernolibroj, instruhelpiloj, kaj didaktikaj maŝinoj.

Pedagogian problemaron oni enmetis ankaŭ enkadre de la I-a Sekcio 'Kibernetiko en sociaj kaj mastrumadaj sciencoj' dum Landa Simpozio 'Kibernetiko 83' (21-22,VI, 83) (komp: Rojewski, 1983/12, p. 555-556). Tie oni konstatis, ke kibernetiko, estante interdisciplina scienco havas karakteron nek pure teorian (kiel matematiko), nek pure praktikan (kiel teknikaj sciencoj). Do ĝi staras inter stirado kaj komunikado. Tial kibernetiko je nuntempa etapo de disvolvo okupiĝas pri tiuj teorioj kaj praktikaj problemoj, kiuj decidas en procezoj de stirado kaj komunikado aŭ influas ĝin.

Instruado kaj edukado estas tiuj ĉi procezoj en kiuj dominas stirado kaj komunikado. Kompreneble, ke kompare kun teknikaj aŭ biologiaj sciencoj en pedagogio oni ankoraŭ ne prilaboris kriteriojn kaj principojn de unusignifa difinado de pedagogiaj parametroj, unuoj kaj mezuroj. Ili konstatis, ke okazas jam iaj provoj - sed mallarĝskale - enkadre de programita instruado, problema instruado, objektivizado de pritakso, struktrizado de lernenhavo kaj teknikizado de instruado.

Partoprenintoj substrekis ankaŭ, ke pedagogia kibernetiko aspiras apliki teorion de sistemoj por prilaboro de universala eduk-didaktika sistemo. La sistemo ebligos kontroli kiuj el subsistemoj aŭ rilatoj de eduk-didaktika sistemo mankas aŭ kiuj funkcias nekonforme.

Ankoraŭfoje okazis atentigo, ke multaj pedagogoj identigas pedagogian kibernetikon kun didaktikaj maŝinoj, kun komputiloj aŭ maŝina pritaksado. Samtempe oni rememorigis, ke pedagogia kibernetiko unuapaŝe 'aplikadas priskribajn formojn de kibernetikaj teorioj por interpretado de pedagogiaj fenomenoj kaj procezoj kaj verifikado de tiuj ĉi teorioj en edukado kaj instruado' kaj en sekvaj stadioj, pedagogia kibernetiko 'enkondukas nocian aparataron de matematiko kaj teknika modeligo' (samloke, p.556).

Laste organizita la II-a simpozio far Sekcio de Pedagogia Kibernetiko (27-28.X.84) pritraktis 'Aplikadon de kibernetiko en pedagogio' en tri problemaj grupoj:

1) Kibernetika pritraktado de didaktiko kaj edukado
2) Kibernetikaj funkcioj de teknikaj rimedoj kaj instrumaterialoj,
3) Kibernetiko en klerigado de instruistoj, kontinua perfektigado, kaj organizado de klerigo.

Estis prezentitaj 21 referaĵojn inter kiuj 3 tuŝis problemon de lingvoinstruado. Malgraŭ tio, ke estas ankoraŭ tro frue por sumigi rezultojn de la simpozio, indas substreki, ke manifestiĝis ĝenerala konvinko, ke, sen kibernetiko kaj teorio de sistemoj neeblas plua pedagogia progreso.

Organiza bazo kaj agado rilate al pedagogia kibernetiko

Antaŭ 22 jaroj en pollando fondiĝis la Pola Kibernetika Asocio (PKA), kies prezidanto ekestis Prof. Oskar Lange. Dekdu jaroj poste, en 1974, enkadre de la PKA ekestis Sekcio de Pedagogia Kibernetiko en Varsovio, kies prezidanto ĝis la jaro 1975 estis d-ro Norbert Drobka kaj de 1975 ĝis nun estras d-ro inĝ. Leonard Rojewski (pli larĝe: L. Rojewski, 1979/5-6, p. 13-14). Fine de la jaro 1975 fondiĝis ankaŭ en Krakovo Sekcio de Kibernetiko de Didaktikaj Procezoj sub la gvidado de doc. E. Berezowski.

La Varsovia sekcio - havanta tutpollandan karakteron - alprenis jenajn celojn:

- organizi memklerigadon de la membroj,
- krei kondiĉojn por objektivaj kaj kritikaj diskutoj rilate al konceptoj de aplikado de kibernetikaj teorioj en pedagogiaj procezoj kaj rezultoj de esploroj,
- ekkonigadi pedagogoj kaj psikologoj kun la plej novaj atingaĵoj de kibernetiko en la mondo kaj lando,
- ekmontradi eblecojn aplikadi sciencajn atingaĵojn de diversaj kibernetikaj teorioj en stirado de eduk-didaktiktaj procezoj.

Menciitajn ĉi supre celojn oni realigas diversforme, ekz:

- sciencdiskutaj kunvenoj, seminarioj, simpozioj,
- prilaborado de instruprogramoj de kibernetiko por instruistaj postdiplomaj studoj,
- oftaj publikaĵoj en pedagogiaj revuoj - dediĉitaj precipe por instruistoj, kun elmontro de praktikaj aspektoj apliki kibernetikon.

Rimarkenda estas la fakto, ke membroj de la sekcio ne havas eblecojn organizi esplorojn aŭ eksperimentojn ĉar la sekcio posedas nek konvenan por tiuj celoj bazon nek financajn rimedojn.

Enkadre de regulaj kunvenoj inter la jaroj 1977-1983 membroj de la Sekcio de Pedagogia Kibernetiko okazis 63 referaĵoj (surbendigitaj). Ĝenerale tiujn ĉi referaĵojn eblas grupigi en 3 klasojn:

1) unuan, kiu pritraktas ĝeneralajn problemojn de kibernetiko: optimaligado, informscienco, stirado, algoritmigado, socia kibernetiko,
2) duan, kiu esploras aplikadon de kibernetika teorio al alia ol ĝis nun interpretado de pedagogiaj procezoj kaj sistemizadon, strukturalizadon, retrokuplojn, ktp.,
3) trian, kiu pritraktas aliajn problemojn kaj konceptojn diskutindajn, precipe metodologiajn aspektojn de pedagogia kibernetiko.

Literaturo

BEREZOWSKI, E.: Problemy modelowania procesów dydaktycznych, Warszawa 1978
FLESZNER, J.: Cybernetyka w pedagogice, en: Nauki filozoficzne współdziałające z pedagogiką, red. B. Suchodolski, Warszawa 1966
GÓDLEWSKI, M., L. KOŁKOWSKI, E. LIPIŃSKI: Problemy algorytmizacji i automatyzacji procesu dydaktycznego, Warszawa 1983
GÓDLEWSKI, M.: Pedagogika. Podręcznik Akademicki, Warszawa 1974
HEROMAN, K.: Teoria informacji na uzytek szkoły, Warszawa 1977;
LEWIN, A.: System wychowania a twórczość pedagogiczna, Warszawa 1983, p. 21
MATUSIAK, J.W.: Cybernetyka a procesa pedagogiczne w wyzszej szkole wojskowej, Warszawa 1978
MAZUR, M.: Cybernetyka i chrakter, Warszawa 1976
NOWACKI, T.: Postulaty badawcze pedagogiki cybernetycznej, en: Dydaktyka Szkoly Wazszej, 1972/3

OKOŃ, W.: Słownik pedagogiczny, Warszawa 1975, p. 42
PIECHOWICZ, E.: Zastosowanie cybernetyki w pedagogice/refleksje po I sympozjum/ en: Nowa Szkoła 1980/7-8, p. 309-312
PSZCZÓŁKOWSKI, T.: Mała encyklopedia prakseologii i teorii organizacji, Warszawa 1978
RADZIEWICZ, J.: Dzaiałlność wychowawcza szkoły, Warszawa 1983, p. 3
ROJEWSKI, L.: Cybernetyka w pedagogice, en: Nowa Szkoła, 1983/12, p. 555-556
ROJEWSKI, L.: Kilka słów o Sekcji Cybernetyki Pedagogicznej, en: Nowa Szkoła, 1979/5-6, p. 13-14
SUCHODOLSKI, B.: Pedagogika. Podręcznik dla kandydatów na nauczycieli, Warszawa 1980/V eldono ŝanĝita
SZANIAWSKI, J.:Model i metoda, Warszawa 1965
WIATROWSKI, Z.: Cybernetyka pedagogiczna jako samodzielna dyscyplina naukowa, en: Szkoła Zawodowa, 1980/1, p. 5-7
WINIARSKI, M.: O podejsciu systemowym w pedagogice, en: Ruch Pedagogiczny, 1978/2, p.141-154.

Ricevita 1984-11-22

Adreso de la aŭtoro: Prof. d-ro Tadeusz Ejsmont, Bartoka 1/49, PL-92547 Łodz

Kybernetische Pädagogik in Polen (Knapptext)

In der Pädagogik hat sich die Richtung der Kybernetischen Pädagogik nur zögernd durchgesetzt. Zwischen der 1962 gegründeten Polnischen Kybernetik-Gesellschaft und den Pädagogen bestanden langezeit keine besonders guten Beziehungen. Selbst in großen Lehrbüchern wird die Kybernetische Pädagogik gar nicht oder nur am Rande erwähnt.
Ein erstes Symposion fand 1979 statt über „Anwendungen der Kybernetik in der Pädagogik", bei dem neben positiven Stimmen noch sehr viel Kritik geäußert wurde (Entmenschlichung zugrunsten der Technik, bloße Begriffsveränderungen durch neue Ausdrücke u.ä.). Beim bisher letzten Symposion 1984 herrschte jedoch die allgemeine Überzeugung vor, daß es ohne Kybernetik und Systemtheorie keinen weiteren pädagogischen Fortschritt geben könne.
Innerhalb der Polnischen Kybernetik-Gesellschaft konstituierte sich 1974 eine Sektion Kybernetische Pädagogik; während regelmäßiger Tagungen entstanden dort 1977 - 1983 insgesamt 63 auf Band aufgezeichnete Vorträge der Mitglieder. Leider erlauben fehlende finanzielle Mittel keine weitreichenden Forschungen auf diesem Gebiet.

Raporto de la Iniciatgrupo AIS (*daŭrigo de paĝo 10*)

I-a Kunsido de la Ĝenerala Asembleo (ĜA) de AIS

Vendredon, la 6-an de januaro 1984 (1683 pfR) kunvenis en la hotelo „La Grotta" la ĜA de AIS por diskuti la jenan tagordon:

1. Konstato de ĉeestoj
2. Decido pri la laborlingvoj por ĉi kunsido laŭ § 8.4 de la statutpropono
3. Elekto de protokolanto(j)
4. Eventuala ŝanĝo de la tagordo
5. Vidigo de la strukturo de la provizora AIS
6. Koncizaj raportoj el la kunsidoj de la senato, de la sekcikolegioj kaj de la konsilantaro
7. Kunlaborprojektoj pritraktitaj dum la unua Sanmarina Universitata Sesio (SUS)
8. Koncizaj raportoj pri oficialaj asocio-kunvenoj dum la 1-a SUS
9. Aprobo de eventuala dungo de Scienca Sekretario (§ 4.9 de la statutpropono)
10. Dato kaj kadra programo de la 2-a SUS (5.9)
11. Diversaĵoj
12. Finparolado de membro de la provizora prezidiumo

Prof.d-ro Neergaard anstataŭante prof.d-ron Pennacchietti (la provizoran, ne plu ĉeestan prezidanton) malfermas kaj gvidas kiel provizora vicprezidanto la kunsidon.

(1) Cirkulas ĉeestlisto. Sidas ĉe la podio Deputito d-rino Fausta Morganti kiel ministrino pri Kulturo de RSM, d-rino Tamagnini kiel ambasadorino de RSM ĉe UNESKO, la provizoraj vicprezidantoj kaj dekanoj prof. d-roj Neergaard kaj Muzic, prof. Casali, s-ro Simonnet kiel tradukisto, prof. d-ro Frank, Adj. prof.d-ro Formizzi, Adj. Marina Michelotti kaj Miriam Michelotti.

(2-4) Oni decidas unuanime alpreni kiel laborlingvojn de ĉi kunsido la Italan kaj ILon kun reciproka traduko, nomumi kiel protokolantojn la profesorojn Szerdahelyi (por ILo) kaj Formizzi (por la Itala)* kaj ne ŝanĝi la tagordon.

(5) Prof.d-ro Frank prezentas bildigon de trovita kompromiso pri la strukturo de la provizora AIS ĝis la oficialigo de statuto. Konforme al la statutpropono la ĜA konsistu laŭ tiu ĉi kompromiso el (1) la membraro de AIS kaj (2) ties konsilantaro. La propono enkadrigas la ĜA en la iniciat- kaj prepargrupojn AIS de Eŭropa Klubo, kies laboron ĝi ne konsideras plenumita antaŭ la aprobo de statuto fare de la registaro de RSM, kaj kies eksterlandan alon daŭrigu gvidi prof. d-ro Frank (estonte anstataŭata de Adj.prof. d-ro Formizzi), kaj la sanmarinan alon Adj.Marina Michelotti (estonte anstataŭata de Miriam Michelotti). La membraro konsistas konforme al la statutpropono (a) el la membroj de la sekcikolegioj (provizore el la jam konstituita Internacia Scienca Kolegio), parto de kiuj stariĝas la provizoran Senaton, kaj (b) el la prooficaj membroj de la prezidiumo. Konforme al la proponita statuto la prezidiumo konsistas el la prezidanto (provizore prof.d-ro Pennacchietti, dekano de la sekcio(j) 2(6), anstataŭantoj: la du aliaj dekanoj prof.d-ro Muzic kaj prof.d-ro Neergaard, samrangaj provizoraj vicprezidantoj), la ministro pri kulturo (anstataŭanto: la ambasadoro ĉe UNESKO) kaj Kanceliero aŭ Ĝenerala Sekretario (provizore prof.Casali kun scienca sekretario kiel anstataŭanto). La 3-persona prezidiumo (kun 4 anstataŭantoj) estas laŭ la kompromispropono plivastigita al 5-persona Alta Komitato (kun du kromaj anstataŭantoj) per la 2 gvidantoj de la iniciat-kaj prepargrupoj de AIS. - La ĜA ne kontraŭas tiun ĉi kompromison.

(6) La ĜA aŭdas resume la kunsidprotokolojn.

(7) La ĜA aprobas la projekton de sekcio(j) 1(4), verki kaj aperigi internacian instruverkon „Prospektiva Klerigscienco", la projekton de la Senato starigi iom post iom sciencan videotekon el prelegoj de kolegianoj de AIS kaj la projekton de internacilingva instruverkaro pri matematiko, fiziko kaj kemio, proponita de Adj.Alonso Nunez en la sekcio(j) 5(3). La ĜA krome danke ekscias pri la disponigo de konferencejo en Kopenhago fare de Adj. lektoro Sellin.

(8) La ĜA aŭdas mallongajn raportojn pri la jarĉefkunveno de Eŭropa Klubo kaj pri la statutakcepta kaj oficialiga kunvenoj de TAKIS (Tutmonda Asocio pri kibernetiko, informadiko kaj sistemiko) - okazintaj en San Marino dum la 2-a SUS; ĝi gratulas al prof.Casali pro ties elektiĝo kiel prezidanto de TAKIS.

daŭrigo paĝo 38

grkg / Humankybernetik
Band 26, Heft 1 (1985)
verlag modernes lernen

Noto pri la scienceco de la Internacia Lingvo

de Rikardo ŜULCO, Mindeno (D)

1. *Tri precipe diferencaj vidpunktoj*

Ekzistas tre diversaj, apenaŭ interakordigeblaj konceptoj pri la esenco de la Internacia Lingvo. Rarafoje ili estas klare kaj penetre pripensitaj. Provante malimpliki ilin, oni trovas, ke ili reduktiĝas al precipe tri vidpunktoj. Ni nomu ilin (1) historiisma/evoluisma, (2) tradiciema/dogmema, (3) analiza/scienca.

2. *Karakterizaĵoj*

2.1 Laŭ la unua la Internacia Lingvo iel, ne tre gravas kiel, estiĝis kiel vivanta fenomeno kaj estas nun unu lingvo pli inter la aliaj. Ĝia bazo, la Fundamento (Zamenhof, 1963), faris sian devon, nun ĝi foriĝu! Ĝusta lingvouzo estas (demokratie) tiu de la plej multaj aŭ (aristokratie) tiu de la plej elstaraj parolantoj. Ĝi konformas al la ĉiufoje aktualaj kutimoj. Ili konsistigas la sekvindan normon. („Mi estas profesia lingvisto ... Sekve mi estas kutimiĝinta konsideri, ke la hodiaŭ tiel nomataj 'eraroj' morgaŭ fariĝas 'reguloj'. Se ne estus tiel, se ni ne akceptus la rezulton de la uzado, ni ankoraŭ parolus Latinon aŭ eble pli fruan lingvon." El

Notiz zur Wissenschaftlichkeit der Internationalen Sprache

von Richard SCHULZ, Minden (D)

1. Drei wesentlich verschiedene Gesichtspunkte

Es gibt sehr unterschiedliche, kaum miteinander zu vereinbarende Auffassungen über das Wesen der Internationalen Sprache. Sie werden selten klar und eindringlich durchdacht. Versucht man, sie zu entwirren, so findet man, daß sie sich auf wesentlich drei Gesichtspunkte zurückführen lassen. Wir wollen sie einmal so bezeichnen: (1) historisch-evolutionistisch, (2) traditionsverhaftet-dogmatisch, (3) analytisch-wissenschaftlich.

2. Charakteristika

2.1 Nach dem ersten Gesichtspunkt ist die Internationale Sprache irgendwie - dieses Wie ist wenig wichtig - als lebendiges Phänomen in Erscheinung getreten und ist nun eine Sprache mehr unter den anderen. Ihre Grundlage, das Fundament (Zamenhof, 1963), hat seine Schuldigkeit getan, das Fundament kann gehen! Richtiger Sprachgebrauch ist (demokratisch) der der meisten oder (aristokratisch) der der hervorragendsten ihrer Sprecher. Er entspricht den jeweilig aktuellen Gepflogenheiten. Sie setzen die befolgenswerte Norm. („Ich bin von Beruf Sprachwissenschaftler . . . Folglich habe ich mich daran gewöhnt zu bedenken, daß das, was heute falsch ist, morgen zur Regel wird. Wäre es nicht so und würden wir nicht, was sich im Gebrauch der Sprache herausbildet,

letero de membro de la Akademio de Esperanto al L. Mimo.)

2.2 Laŭ la dua koncepto la Internacia Lingvo estas difinita per ĝia triparta Fundamento, t.e. per la Gramatiko, la Ekzercaro kaj la Universala Vortaro, al kiuj apartenas ankaŭ la Antaŭparolo kaj al kiuj aldoniĝas - kun certaj limigoj - tute ĝenerale la Zamenhofa lingvouzo. Estas la tasko de la Akademio de Esperanto ŝirmi la netuŝeblecon de la Fundamento, akordigi, kio estas ne akordigebla, nome la Fundamento kun la Zamenhofa lingvouzo, sankcii lingvajn kutimojn, kiuj sufiĉe forte estas altrudiĝintaj, kaj laste, kiam aliaj rimedoj ne plu disponiĝas, tranĉi la Gordian nodon kaj decidi per sia, tute ne malkontestata aŭtoritato. Ĝustaestas, kion aprobas la Akademio.

2.3 Laŭ la tria koncepto la Internacia Lingvo baziĝas precipe sur la deksesregula gramatiko kiel kerno de la Fundamento, kiu, kvankam ne kompleta, tamen ebligas kompletigi ĝin helpe de la logiko el ĝiaj propraj premisoj. Tio implicas, ke tiuj apartaĵoj de la Zamenhofa lingvaĵo, kiuj ne konformas al la logiko, estas eksterlasendaj.

3. *Kritiko*

3.1 La unua koncepto estas tiu de la multegaj novemuloj kaj „plibonigantoj" de la lingvo. Preskaŭ ĉiu freŝa adepto de la Internacia Lingvo alportas sian kontribuaĵon, inklinas modli la lingvon. Al tiu ĉapitro apartenas la Ido-skismo, la multaj provoj forigi la ĉapelitajn literojn, la pro-

übernehmen, wir sprächen heute noch Latein oder möglicherweise eine noch frühere Sprache." - Aus einem Brief eines Mitgliedes der Esperanto-Akademie an L. Mimo.)

2.2 Nach der zweiten Auffassung wird die Internationale Sprache durch ihr dreiteiliges Fundament bestimmt, das sind die Grammatik, das Übungswerk und das Allgemeine Wörterbuch, zu denen auch das Vorwort gehört und zu denen - mit gewissen Einschränkungen - ganz allgemein der Sprachgebrauch Zamenhofs hinzukommt. Aufgabe der Esperanto-Akademie ist es, die Unverletzbarkeit des Fundaments zu sichern, das Nichtvereinbare, nämlich Fundament und Sprachgebrauch Zamenhofs, miteinander in Einklang zu bringen, sprachliche Gewohnheiten, die sich hinlänglich stark aufgedrängt haben, zu sanktionieren, und schließlich, wenn andere Möglichkeiten nicht mehr zur Verfügung stehen, den gordischen Knoten durchzuschneiden und kraft ihrer, keinesfalls unangefochtenen Autorität Entscheidungen zu treffen. Richtig ist, was die Akademie anerkennt.

2.3 Nach der dritten Auffassung beruht die Internationale Sprache hauptsächlich auf der Grammatik der sechzehn Regeln als dem Kern des Fundaments, die, obgleich nicht vollständig, es dennoch ermöglicht, sie mit Hilfe der Logik aus ihren eigenen Voraussetzungen zu vervollständigen. Das beinhaltet auch, daß diejenigen Besonderheiten im Sprachgebrauch Zamenhofs, die der Logik nicht entsprechen, auszuschließen sind.

3. Kritik

3.1 Die erste Auffassung ist die der allzuvielen Neuerungssüchtigen und „Sprachverbesserer". Fast jeder Neuling steuert seinen Beitrag zur Internationalen Sprache bei, möchte die Sprache etwas umgestalten. In dieses Kapitel gehören die Ido-Spaltung, die vielen Versuche, die Überzeichen auf den Buchstaben abzuschaffen, die Vorschläge von Karolo Piĉ (1981),

ponoj de Karolo Piĉo (1981), tiuj de Ilmaro Tamelo (1978), kaj de sennombraj aliaj. Fine de 1984 aperis lingvo-kurso, kiu ne nur proponas, sed fakte ja enkondukas novan prefikson 'go-' kaj novan pronomon 'ŝili' (Eichholz, 1984). La listo jam ne estas supervidebla. Sur tiu vojo la Internacia Lingvo daŭre kaj senhalte pli ĥaosiĝas, pli komplikiĝas, dialektiĝas, ĉiam pli proksimiĝas al la etnaj lingvoj. Kio restas, estas ĝia nura neŭtraleco (kaj eĉ tiu povus malaperi!). For estas ĝiaj simpleco kaj racieco. Estas atentinde, ke Zamenhofo ne miskompreneble kontraŭis tiun tendencon, insistante pri la netuŝendeco de la Fundamento, kiu ja estis kreata ĝuste tiucele.

3.2 La dua estas ja pli aŭ malpli la oficiala koncepto de la Universala Esperanto-Asocio kune kun la gravaj organizoj de la internacia Esperanto-Movado, precipe de la Akademio de Esperanto. Iliaj klopodoj egalas al la kvadraturo de la cirklo. Ĉiam denove la kontraŭdiroj inter la logiko kaj la Zamenhofa lingvouzo kaŭzas al ili malfacilaĵojn. Jen ili preferas la logikon, jen ili preferas la aŭtoritaton de la Zamenhofa lingvouzo. Inter ambaŭ principoj ili ŝanceliĝas kaj reagas al kritikoj plej eble per prisilentado aŭ tabuado. Koloĉajo kaj Varengjeno, du gvidaj apogantoj de ĉi tiu koncepto, kies influo regas preskaŭ ekskluzive la oficialan Esperantismon, ekzemple konstatas unuflanke (Kalocsay/Waringhien, 1980. p. 347), ke Zamenhofo post 'kvazaŭ' „uzis en tute analogaj frazoj jen indikativon, jen kondicionalon", kaj ili diras, ke „la gramatika logiko pledas nekontesteble por kondicionalo post 'kvazaŭ' ". Ili do malpravigas Zamenhofon per la

die von Prof. Ilmar Tammelo (1978) und zahlreicher anderer. Ende 1984 erschien ein Sprachkurs, der eine neue Vorsilbe „go-" und ein neues Personalpronomen „ŝili" nicht nur vorschlägt, sondern regelrecht einführt (Eichholz, 1984). Die Liste ist schon nicht mehr überschaubar. Auf diesem Wege wird die Internationale Sprache ständig und unaufhaltsam chaotischer, verwickelter, bildet sie Dialekte und nähert sich immer mehr den ethnischen Sprachen. Was bleibt, ist ihre bloße Neutralität (und selbst die könnte verschwinden!). Einfachheit und Rationalität sind dahin. Es ist bemerkenswert, daß Zamenhof diese Tendenz unmißverständlich ablehnte, indem er auf der Unverletzbarkeit des Fundaments bestand. Es war ja gerade in dieser Absicht geschaffen worden.

3.2 Die zweite Auffassung ist die mehr oder weniger offizielle des Esperanto-Weltbundes und die der wichtigen Organisationen der internationalen Esperanto-Bewegung, besonders der Esperanto-Akademie. Deren Bemühungen kommen der Quadratur des Zirkels gleich. Immer von neuem verursachen ihnen die Widersprüche zwischen Logik und dem Sprachgebrauch Zamenhofs Schwierigkeiten. Sie schwanken zwischen beiden Prinzipien hin und her und reagieren auf Kritik möglichst durch Schweigen oder Tabuierung. Kalocsay und Waringhien, zwei führende Verfechter dieser Auffassung, deren Einfluß fast ausschließlich den offiziellen Esperantismus beherrscht, stellen z.B. einerseits fest (Kalocsay/Waringhien, 1980, p.347), daß Zamenhof nach ‚kvazaŭ' „in gänzlich gleichartigen Sätzen bald den Indikativ, bald das Konditional gebraucht", und sie sagen, daß „die grammatische Logik nach ‚kvazaŭ' unbestreitbar das Konditional verlangt". Sie setzen Zamenhof also durch die Logik ins Unrecht. Dennoch andererseits, obgleich Zamenhof in seinem Übungswerk ‚tiel' und ‚kiel' entgegen der Logik zweiundzwanzigmal zum Ausdruck von Graden vor Adjektiven und Adverbien gebraucht, sanktionierten sie

logiko. Tamen aliflanke, kvankam Zamenhofo en la Ekzercaro uzas kontraŭlogike 'tiel' kaj 'kiel' dudek du fojojn antaŭ adjektivoj aŭ adverboj por esprimo de gradoj, ili sankciigis tiun uzon malpravigante la logikon (Ŝulco, 1984, 1985). Estas atentinde, ke Zamenhofo (1962, p. 115) klare kontraŭis ankaŭ ĉi tiun tradicieman/dogmeman koncepton: „Tamen la diferenco inter lingvo natura kaj lingvo arte farita konsistas en tio, ke, dum en la unua oni devas uzi nur tiujn formojn, kiujn uzas bonaj verkistoj, kaj uzado de formo pli logika estas malpermesata, - en lingvo arte farita ĉiu havas la rajton uzi formon pli logikan, kvankam neniu ĝis nun ĝin uzis..."
3.3 Nur la tria, analiza/scienca, koncepto estas pravigebla. Kaj ĝi estas plene Zamenhofa, ĉar Zamenhofo mem ja diris, ke en la Lingvo Internacia oni devas obei sole nur la logikon. Tio implicas, ke en ĝi oni devas obei la logikon pli ol Zamenhofon. La logiko nome estas komuna al ĉiuj homoj, kaj ĝiaj decidoj estas devigaj. Per la apliko de la logiko al la deksesregula gramatiko la lingvo fariĝas scienco. Estas ja miregiga fakto, ke Zamenhofo, kiu ne estis profesia lingvisto, kreis, persiste laborante dum longaj jaroj, per preskaŭ senekzempla intuo, la bazan gramatikon de la dek ses reguloj, kiu per ĝia modela simpleco kaj preskaŭ senpera memevidenteco, laŭ 'historia evoluo' fariĝis en 1905 en Bulonjo-ĉe-maro netuŝebla konvencio, kaj ke li ankaŭ, insistante pri la logiko, montris la vojon, kiel la lingvo, sen nenecesaj komplikigaĵoj, povas perfektiĝi per kreskanta racieco kaj tamen konservi sian simplecon kaj internacian kompreneblecon. Analoga, do kompareb-

diesen Gebrauch und gaben Zamenhof zuungunsten der Logik recht (Ŝulco, 1984, 1985). Dabei ist zu beachten, daß Zamenhof (1962, p.115) auch dieser traditionsverhafteten-dogmatischen Auffassung entgegenstand: „Dennoch besteht der Unterschied zwischen einer natürlichen und künstlich erstellten Sprache darin, daß, während man in der ersteren nur diejenigen Formen gebrauchen darf, die von guten Schriftstellern gebraucht werden, und der Gebrauch einer logischeren Form verboten ist, – in einer künstlichen Sprache einem jeden das Recht zusteht, eine logischere Form zu gebrauchen, selbst wenn bis jetzt noch niemand sie gebraucht hat ..."
3.3 Nur die dritte, analytisch-wissenschaftliche Auffassung läßt sich rechtfertigen. Auch entspricht sie völlig der Zamenhofschen, denn er selbst hat ja gesagt, daß man in der Internationalen Sprache ausschließlich der Logik gehorchen solle. Das bedeutet, daß man in ihr mehr als Zamenhof der Logik folgen soll. Die Logik nämlich ist allen Menschen gemeinsam, und ihre Entscheidungen sind verpflichtend. Durch Anwendung der Logik auf die Grammatik der sechzehn Regeln wird die Sprache zur Wissenschaft. Es ist ja eine erstaunliche Tatsache, daß Zamenhof, der von Beruf kein Sprachwissenschaftler war, durch beharrliche und langjährige Arbeit mit fast beispielloser Intuition die Grammatik der sechzehn Regeln schuf, die durch ihre vorbildliche Schlichtheit und fast unmittelbare Offensichtlichkeit, auf dem Wege „historischer Entwicklung", 1905 in Boulogne-sur-mer zur unantastbaren Konvention wurde, und daß er auch, indem er eindringlich auf die Logik hinwies, den Weg zeigte, wie die Sprache, ohne überflüssige Kompliziertheiten, durch zunehmende Rationalität sich vervollkommnen und dennoch ihre Schlichtheit und internationale Verständlichkeit bewahren kann. Ein analoges, also vergleichbares Ereignis war die Schaffung des Meters als verbindliche Maßeinheit.

la evento estis la kreo de la mezurunuo 'metro', kiu ankaŭ estas nura konvencio kaj kiu tamen per la al ĝi aplikenda logiko ebligas la modernajn natursciencojn. Tion ja ĉiu ajn alia mezurunuo ankaŭ povus efektivigi per respektiva konvencio. Sed ĉar ĉi tiu mankas, la 'metro' rezultas optimuma. Tute same, estas penseblaj ankaŭ aliaj arte faritaj lingvoj baziĝantaj sur aliaj reguloj. Sed ĉar ne ekzistas konforma konvencio pri iu ajn el ili, la Internacia Lingvo rezultas optimuma. La homaro ne plu havas la tempon, ankoraŭfoje ripeti tiun centjaran eksperimenton. Ambaŭ konvencioj, por perfekta funkciado, bezonas esti severe observataj, bezonas severan netuŝendecon kaj krome la striktan aplikon de la ĉiuhoma logiko. Ambaŭ konvencioj cetere estas bone adaptitaj, la metro al la homa korpo, la deksesregula gramatiko al la homa intelekto.

Auch das Meter ist nur eine Konvention, und dennoch ermöglicht es durch die Anwendung der Logik die modernen Naturwissenschaften. Das könnte freilich auch jede beliebige andere Maßeinheit durch eine entsprechende Konvention bewirken. Aber da es diese nicht gibt, bleibt das Meter optimal. Ganz genauso sind auch andere Plansprachen denkbar, die auf anderen Regeln beruhen. Da es aber für keine von ihnen eine entsprechende Konvention gibt, bleibt auch die Internationale Sprache optimal. Die Menschheit hat nicht mehr die Zeit, noch einmal ein solches hundertjähriges Experiment zu wiederholen. Beide Konventionen müssen, um perfekt zu funktionieren, strengstens eingehalten werden. Sie kommen ohne Unantastbarkeit und außerdem ohne strikte Anwednung der Logik nicht aus. Die schafft die allgemein menschliche Verbundenheit. Beide Konventionen sind übrigens, das Meter dem menschlichen Körper, die Grammatik der sechzehn Regeln dem menschlichen Verstand auf das beste angepaßt.

4. *Konkludaj rekomendoj*

La baza regularo de la Internacia Lingvo ne estas kompleta. Tio altigas ĝian valoron kiel propagandilon, kontribuas ankaŭ al ĝia konvinka evidenteco. Sed ĝi estas kompletigebla. Ĝi nome determinas, per aplikado de la logiko, la strukturon de la lingvo ĝis en la lastaj detaloj: la konjugacion, la vortfaradon, la komparacion, la uzon de la refleksivo (vd. Mimo, 1973, 1984, a,b). Tiun kompletigon Zamenhofo komisiis al la Esperantistaro. La tasko ne estas ĉiam denove inventeme modli iun aŭ alian lingveron, komplikigi la lingvon per novaj harfendaj distingiloj, ŝanĝi la bazan strukturon per novaj prepozicioj, pronomoj, finaĵoj aŭ alie, sankcii erarojn, ĉar ili estas tradiciaj, eĉ

4. Zusammenfassende Empfehlungen

Die Basisgrammatik der internationalen Sprache ist nicht vollständig. Das erhöht ihren Wert für Propagandazwecke, trägt auch zu ihrer überzeugenden Einsichtigkeit bei. Sie läßt sich aber vervollständigen. Sie bestimmt nämlich, bei Anwendung der Logik, die Struktur der Sprache bis in letzte Einzelheiten der Konjugation, der Wortbildung, der Komparation und der Anwendung des Reflexivpronomens (s. Mimo, 1973, 1984a,b). Diese Vervollständigung hat Zamenhof der Esperantistenschaft aufgetragen. Aufgabe ist nicht, immer wieder erfinderisch an der einen oder anderen sprachlichen Einzelheit herumzubasteln, die Sprache durch Einführung haarspaltender Unterscheidungsmittel zu komplizieren, ihre Grundstruktur durch neue Verhältniswörter, Fürwörter, Endungen oder sonstwie

Zamenhofaj. La tasko estas evoluigi la lingvon ene de la limoj, kiujn starigas la baza regularo kaj la logiko, kaj tiel konservi al la lingvo ĝian simplecon, raciecon, kompreneblecon, internaciecon kaj belecon. Ke tiu konvencio ekzistas, estas verŝajne ne ripetebla ŝanco.

Resume oni povas diri, ke la Internacia Lingvo estas laŭ sia strukturo kohera sistemo logike evoluigita el la principe konvencia sed fakte menskonforma kaj tial konvinka Fundamenta regularo. Ĝia plua evoluigo nur povas sekvi la modelon de la ekzaktaj sciencoj: netuŝante la bazan konvencion strikte apliki la logikon kaj eĉ forigi ĉiujn tradiciajn erarojn (senkonsidere ajnan aŭtoritaton krom la logiko!), kiuj malatentas la sintezan efikon de la baza regularo kaj la logiko.

La provizora Senato de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) decidis, ke la Internacia Lingvo estu la precipa laborlingvo de tiu institucio (vd. Iniciatgrupo, 1984, p. 133). Ĉar tiu lingvo estas io esence alia ol la etnaj lingvoj, AIS nepre devas difini en sia statuto, kion ĝi komprenas per Internacia Lingvo. Kiel scienca institucio AIS povas nur sekvi la analizan/sciencan vidpunkton. Tio postulas, ke oni, insistante pri la nepre sekvenda logiko, rigardu la deksesregulan gramatikon kiel la kernan, precipan parton de la Fundamento, kaj ke teksteroj, en kiuj la Zamenhofa lingvo-uzo devias de la logiko, devas esti indikataj kiel arkaikaj, ne plu rekomendindaj, eĉ evitendaj formoj.

zu verändern, Irrtümer zu sanktionieren, weil sie traditionell geworden sind oder von Zamenhof stammen. Die Aufgabe ist, die Sprache innerhalb der Grenzen von Basisgrammatik und Logik zu entwickeln und so der Sprache ihre Schlichtheit, Rationalität, Verständlichkeit, Internationalität und Schönheit zu bewahren. Daß diese Konvention überhaupr besteht, ist ein wahrscheinlich nicht wiederholbarer Glücksfall.

Zusammenfassend läßt sich sagen, daß die Internationale Sprache ihrer Struktur nach ein, aus der ausschließlich konventionellen, aber tatsächlich dem menschlichen Verstande angemessenen und darum überzeugenden Basisgrammatik, logisch entwickeltes, zusammenhängendes System ist. Ihre weitere Entwicklung kann nur dem Modell der Wissenschaften folgen. Das heißt, ohne die Basiskonvention anzutasten, streng die Logik anzuwenden und sogar alle traditionellen Irrtümer auszumerzen, die das synthetische Zusammenwirken von Basisgrammatik und Logik außer acht lassen, und zwar ohne Rücksicht auf welche Autorität auch immer außer der der Logik.

Der einstweilige Senat der Internationalen Akademie der Wissenschaften (AIS) hat verfügt, die Internationale Sprache zur ersten Arbeitssprache dieser Institution zu machen (vgl. den Bericht der Arbeitsgemeinschaft, 1984, p. 133). Da diese Sprache vom Wesen her etwas anderes ist als die ethnischen Sprachen, muß diese Akademie in ihrer Satzung unbedingt definieren, was sie unter Internationaler Sprache versteht. Als wissenschaftliche Institution kann sie nur dem analytisch-wissenschaftlichen Gesichtspunkt folgen. Das erfordert, daß man, unter nachdrücklichem Hinweis auf die Logik, die Grammatik der sechzehn Regeln als den Kern und wichtigsten Teil des Fundaments ansieht, und daß Textstellen, in denen der Sprachgebrauch Zamenhofs von der Logik abweicht, als veraltete, nicht mehr empfehlenswerte und folglich zu vermeidende Formen angezeigt werden.

Literaturo/Schrifttum

EICHHOLZ, Vilma Sindona: En novan mondon, Rektmetoda kurso por geknaboj. Esperanto Press, Bailieboro, Ontario, Kanado 1984.

INICIATGRUPO AIS de Eŭropa Klubo: Raporto pri la plenumita priparlaboro. Tria parto. grkg/Humankybernetik 25/3, 1984, p. 132 - 136.

KALOCSAJ, K., G. WARINGHIEN: Plena Analiza Gramatiko de Esperanto. Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, ^{4}1980.

MIMÓ, Luis: Kompleta lernolibro de regula Esperanto (Analiza Skolo). Ĉe la aŭtoro, Sabadell 1973.

MIMÓ, Luis: Kiel konstrui planlingvon? grkg/Humankybernetik 25/4, 1984.

MIMÓ, Luis: Esperanto por la jaroj du mil (Analiza Skolo). Ĉe la aŭtoro havebla tajpaĵo. 1984.

PIĈ, Karolo: La Litomiŝla tombejo. Roman. Artur E. Iltis, Saarbrücken 1981. (La romano kaj ĝiaj lingvaj problemoj, p. 227; Notoj, p. 251; Notoj kaj klarigoj, p. 253)

ŜULCO, Rikardo (eldonisto): Vestfaliaj Flugfolioj, n-ro 66, Dec. 1984 - L. Mimo: Lingva Angulo (Unue publikigita en sennaciulo Aŭg.-Sept. 1984) - R. Ŝulco: Letero al legantino de Sennaciulo. - L. Mimó: Letero al legantino de Sennaciulo. - G. Waringhien: Lingva Angulo (Unue publikigita en Sennaciulo Okt. 1984).

ŜULCO, Rikardo (eldonisto): Vestfaliaj Flugfolioj, n-ro 67, Jan. 1985 - L. Mimó: Letero al prof. Gastono Varengjeno. - R. Ŝulco: Pri la Varengjena lingva angulo en Sennaciulo de Okt. 1984. - L. Mimó: Ludoviko Mimoo publike demandas.

ŜULCO, Rikardo: Pledo por unueca lingvo. Esperanto-Centro, Paderborno 1985 (presota).

TAMMELO, Ilmar: Semiotische Gediegenheit als plansprachliche Aufgabe (Ne publikigita tajpaĵo, ĉirkaŭ 1978)

ZAMENHOF, L.L.: Lingvaj respondoj, konsiloj kaj opinioj pri Esperanto. Esperantaj Francaj eldonoj, Marmande ^{6}1962.

ZAMENHOF, L.L.: Fundamento de Esperanto. Kun enkondukoj, notoj kaj lingvaj rimarkoj de d-ro A. Albault, Esperantaj Francaj eldonoj, Marmande ^{9}1963.

Ricevita/eingegangen 1985-01-15

Adreso de la aŭtoro/Anschrift des Verfassers: R. Schulz, Weserstr. 8, D-4950 Minden

Anmerkung der Schriftleitung:

Obige zweisprachig eingegangene Notiz scheint geeignet, einerseits den (noch nicht ausnahmslos ILo-verstehenden) Kybernetikern und anderen Fachvertretern monothetischer Wissenschaften einen Anstoß zu geben, andererseits bei den (selten auch des Deutschen mächtigen) ILo-Sprechern großenteils Anstoß zu erregen. Wir entschlossen uns daher, auch diesen Beitrag ausnahmsweise zweisprachig zu veröffentlichen.

Raporto de la Iniciatgrupo AIS (*daŭrigo de paĝo 30*)

(9) La ĜA ne decidas pri la propono, dungi s-ron Simonnet kiel sciencan sekretarion de AIS.

(10-12) La ĜA rezignas pritrakti tiujn ĉi erojn.

****Rimarkigo:***
Ĉiuj ekzempleroj de la originala protokolo kun ĉeestlisto malaperis kaj ĝis nun ne retroviĝis. Ĉi resumo estis antaŭ publikigo submetata al la kontrolo de ĉiuj membroj (kun anstataŭantoj) de la prezidiumo kaj al prof.d-ro Szerdahelyi.
Frank

Protokolo pri la kunsidoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) 1984-11-24 en Paderborn (D)

Ĉeestis: prof.d-ro Neergaard kaj Adj.Sellin (DK), prof. Alsleben, prof.d-ro Frank, prof.d-ro Schick, Lib.Doc. PD d-ro Sachs kaj PD d-ro Fischer (D), kaj Adj. d-ro Lejk kaj d-ro Ejsmont (PL).

1. Enkonduko

La provizora prezidanto de AIS (prezidanto de la Internacia Scienca Kolegio - ISK - establiĝinta en San Marino 1983-12-28 - vd. la protokolon ekz. en grkg/Humankybernetik 3/84, pj 132-133) invitis per oficiala sciigo (lok.cit. p. 136) al neoficiala kunveno kadre de la Paderborna Novembra renkontiĝo. Ĝi komencis en Salono Kaukal 1984-11-24,9:15 h. Gvidis kiel vicprezidanto prof. d-ro Neergaard anstataŭ prof.d-ro Pennacchietti foresta, kiu salutigis. Prof.d-ro Frank transdonis la telegramajn salutojn de ministrino d-rino Fausta Morganti kaj de Sinjorinoj Michelotti el San Marino. Li voĉlegis siajn notojn pri la germanlingva telefona interparolado de 1984-11-21 kun la ministrino. Prof.d-ro Neergaard informis pri sia interparolado pri kunlaborebloj kun la prezidanto de la Maison Internationale des Intellectuels (M.I.D.I.), Ĝenerala Konsulo prof.Walter Heubl, la antaŭan tagon en Paderborn. Prof.d-ro Frank voĉlegis leteron de la prezidanto de Eŭropa Klubo (EK), laŭ kiu la rolo de EK en la starigo de AIS konsiderendas finiĝinta per la okazigo de la unua Sanmarina Universitata Sesio (SUS). - Pro tio, ke ĉiuj ISK-anoj cirkulere estis avertitaj pri la eblo, ke ĉi neoficiala kunveno laŭbezone oficialiĝos, prof.d-ro Frank invitis al samloka kolegikunsido de la sekcio 1(4) je la 11:05 h, prof. d-ro Neergaard al senatkunsido je la 11:10 h, kaj al Ĝenerala Asembleo je la 11:15 h.

2. Protokolo de la II-a Kolegikunsido de la Sekcio(j) 1(4) - Kibernetiko (kun Filozofio)

Prof.d-ro Frank kiel vicdekano konstatas la laŭregularecon de la kunsido, kiu nur celis kaj decidas la akcepton de d-ro Tadeusz Ejsmont (PL) kiel adjunkto en la fakaro 1.1.

3. Protokolo de la III-a Senatkunsido

Prof.d-ro Neergaard kiel vicprezidanto konstatas la laŭregularecon de la kunsido, kiu nur celis aprobi kaj aprobas la akcepton de d-ro Ejsmont - (vd. supre la protokolon de la II-a kolegikunsido de la sekcio(j) 1(4)), de d-ro Fischer kaj prof. Minguez (vd. la protokolon pri la I-a kolegikunsido de ĉi sekcio ekz. en grkg/H. 3/84, p.135) kiel novaj adjunktoj de la sekcio(j) 1(4), kaj de la gesinjoroj Albault, Landmark kaj Sellin kiel adjunktoj kaj de la profesoroj Celakovski, Azorin kaj Dagys kiel profesoroj de la sekcio(j) 3(5) - vd. la protokolojn de la kunsidoj I kaj III de ĉi sekcio.

4. Protokolo de la II-a Ĝenerala Asembleo (ĜA)

Prof.d-ro Neergaard kiel vicprezidanto malfermas 11:15 h, salutas kaj konstatas la laŭregularecon. Prof.d-ro Frank konstatas, ke ĉiuj ĉeestantoj estas membroj de IKS, do de la provizora ĜA, ĉar PD d-ro Fischer kaj d-ro Ejsmont estis ĵus unuanime akceptitaj kiel adjunktoj de sekcio(j) 1(4), Adj.Sellin de sekcio(j) 5(3).

La ĜA unuanime decidas elekti ILon sola kiel laborlingvon kaj unuanime elektas docenton d-ron Sachs protokolanto.

La jena tagordo estas akceptita:
- Plua rolo de EK por AIS
- Mallongigo de la AIS-statuto
- Sekvonta SUS
- Buĝeto kaj laborplano.

daŭrigo paĝo 46

grkg / Humankybernetik
Band 26, Heft 1 (1985)
verlag modernes lernen

Stochastische Spracherzeugung als Lernsystem

von Miloš LÁNSKÝ, Walter KERNDL, Leopold LEHNER, Paderborn (D)

aus dem Forschungsteam 'Informatik und Bildung' an der Universität-Gesamthochschule-Paderborn

1. *Einleitung*

